# Scienca Revuo denove en danĝero

*Carl Støp-Bowitz* (Norvegio)
prezidanto de ISAE

Kiel vi konstatis, SR nun pli-malpli regule aperadas. Ni sukcesis posteldoni iom reduktitajn (du-kajerajn) volumojn 30, 31, 32, kiuj kovras la «perditajn» jarojn 1979, 1980, 1981. La volumo 33 (1982) denove provas esti kvarkajera.

Nia **granda problemo** nun estas, ke nekontentige progresas la rekolektado de iamaj membroj kaj la kolektado de novaj membroj. Laŭ lasta statistiko, alvenis kotizoj por 1982, kiuj apenaŭ sufiĉus por eldoni unusolan SR-kajeron por tiu jaro.

Kelkaj landaj delegitoj modele laboras, sed kelkaj tute ne reagas, sendas nek membrolistojn, nek kotizojn. Tio ne povas daŭri, alie ni devos «fermi la butikon». Por povi vivi, ISAE kaj SR bezonas minimume 400-500 pagantajn membrojn.

Restas ankoraŭ grandaj stokoj de SR, vol. 30-32, sekve ni povas ankoraŭ akcepti membrojn ankaŭ por tiuj pasintaj jaroj. La kotizo estas egalvalora al 20 svisaj frankoj.

Okazas, ke ne-sciencistoj, amatoroj aŭ aliaj, kiuj interesiĝas pri legado de pli-malpli popularsciencaj artikoloj, demandas, ĉu ili povas aboni al SR. Nenio malhelpas akcepti ilin kiel abonantojn de SR, por la sama kotizo (sed ili formale ne estos membroj de ISAE). Tiel ni povos utiligi la restantajn stokojn de SR, kiuj nun ŝimas en la garaĝo de la presisto, kaj akiri abonkotizojn tiom bezonatajn.

Karaj kunlaborantoj! Via estraro laboregas por vivteni la asocion kaj la revuon. Nun mi apelacias al ĉiu el vi: bonvolu streĉi maksimume viajn fortojn por revarbi la iamajn membrojn kaj varbi novajn membrojn kaj aliajn abonantojn. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, sed komencu jam hodiaŭ! Urĝegas akiri membrojn kaj abonantojn, kies kotizoj estas necesaj por daŭrigi la aperigadon de SR.

Dezirante al ĉiu el vi grandan sukceson en via varba laboro, salutas sincere via

*C. Stǿp-Bowitz*

**Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**

Direttore responsabile: Aldo de' Giorgi
Registrazione n. 2 del 3.2.82 presso il Tribunale di Pisa
Stampato nel luglio 1983 — Presita dum julio 1983

## Enhavo

**N-ro 3 (141): botanika kajero**

Botanika vortaro de *F. Mlynář*
*(Josef Kvaka- František Mlynář)* ........ p. 69

La minimumaj areoj de surŝela likenkunaĵo de *Physconia grisea*
*(René Rieux - Claude Roux)* ........ p. 87

SCIENCA REVUO denove en danĝero
*(Carl Stǿp-Bowitz)* ........ p. 100